

2023 年 10 月 21 日実施

一般財団法人日本エスペラント協会
エスペラント学力検定試験 2 級筆記試験および会話試験
問題兼解答用紙

受験番号：

1 一般問題<100点>

1. 下記は、18 世紀末にイギリスがオーストラリア開拓を進めているとき、先住民がそれをどう見ていたかを語る文です。(出典:”Flugi kun kakatuoj” de Trevor Steele より)
- これを読んで、下の設問に答えてください。(60 点)

La eta knabo surgenuiĝis, kvazaŭ tiel li pliproksimiĝus kaj pli bone vidus la spektaklon. Tute alte sur la rokmuro li povis kaŭre gvati ĝis la horizonto, sed la plilongiĝantaj ombroj diris al li, ke restas nur iom da taglumo. Li nur duone aŭskultis la koleran voĉon de Elmaru, kiu alterne fingromontris al la formiksimilaj homfiguroj kaj bestoj malsupre kaj turnis sin al la homoj ĉirkaŭ si. Jangabara, la rondvizaĝa knabo, kaŭris inter grupo de samaĝuloj, kaj kaptis nur kelkajn frazojn el la buŝo de tiu potenculo Elmaru, pri kiu oni diris, ke li kapablas devigi eĉ malamikojn fari, kion li volas. Sed kiam Elmaru parolis tiel kolere, li ŝajnis malpli potenca, kriante kontraŭ fortoj, kiujn li ne regis.

Jangabara sciis, ke kiam li mem volis plori aŭ sakri pro nevenkebla obstaklo aŭ io timinda, li koleriĝis. Do ĉu eĉ Elmaru timis la etajn homfigurojn tie malsupre?

Provizore Jangabara vidis kaj aŭdis nenion alian krom la raŭke kriĉantajn kakatuojn, kiuj preterflugis en sia blanka gloro. Kiel ĉiuj Banubi-infanoj, li sciis, ke kakatuoj estas sanktaj birdoj, eĉ se ilia voĉo estas surdiga kaj nedolĉa.

La bela blanka svarmo flugis pluen, kaj la knabo ree kaptis frazojn el la buŝo de la granda viro Elmaru: “... ili jam forprenis la teron de la Mirari kaj la Bunambi kaj la Gujini kaj de la insulanoj ... tiuj popoloj nun estas sklavoĵoj sen tero ... devas plonĝi en la maron kaj elpreni konkojn ... kaj la virinoj devas malfermi siajn krurojn al la fekuloj ... kaj en aliaj lokoj la fekuloj forprenis la teron de la Ngurabi kaj Njangari kaj grasigas tie siajn stultajn longharajn blankajn bestojn.”

Jangabara rigardis malsupren al la etaj homoj kaj iliaj bestoj, kiuj moviĝis malrapide kaj paralele al la klifoj, sur kiuj li kaj Elmaru kaj dekoj da aliaj klananoj staris. Subite Elmaru enmanigis ŝtonon kaj ĵetegis ĝin en la direkton de la foraj homoj. Kompreneble la ŝtono neniel atingus la celon, sed Jangabara rigardis fascinate ĝian trajektorion. Ĝi falis, falis en kurba flugo, falis senfine, sed malaperis kaj eble eĉ ne atingis la teron tie sube, tiel altaj estis la klifoj. Kaj la homoj kaj bestoj estis almenaŭ tiom for de la klifbazo, kiom li, Jangabara, povus plenforte kuri senpaŭze – ili tute ne suspektus, ke iu ĵetas ŝtonon preskaŭ el la nuboj.

Elmaru turnis sin refoje al siaj kunuloj: “Kaj vidu, ili volas veni sur nian teritorion. Jes, ili ne povas pasi tra nia montaro, sed ili provos. Kaj se iam ili atingos nian teron, ili uzos niajn fontojn kaj riveretojn, kaj iliaj malpuraj rajdhundoj kaj kornaj blekbestoj kaj longharaj blankaj bestoj manĝos la herbojn kaj forpelos niajn bestojn. Kaj – mi jam vidis tion aliloke – ili faros aĉodoran ŝlimon el niaj sanktaj akvejoj ...”

Sed Jangabara ne povis vidi kornajn aŭ longharajn bestojn en la procesio tie malsupre. El tia granda distanco oni ne bone vidis, eĉ Elmaru kun sia akra vidpovo devis nur diveni, kiel aspektas la homoj en varmaj korpokovraĵoj. Kaj kiom ili estis? Jangabara uzis siajn fingrojn: jes, ili nombris proksimume tiom, kiom da fingroj li havis. Kaj eblis vidi, ke ili ja rajdas sur bestoj, kiuj tamen ne vere aspektas similaj al hundoj. Evidente Elmaru ne ŝatis tiujn rajdobestojn, sed Jangabara provis imagi, kiel estus, se li mem sidus sur tia portobesto. Eble interese.

sakri: ののしる kakatuo: カカトゥ (オーストラリアの野鳥)

Banubi, Mirari, Bunambi, Gujini, Ngurabi, Njangari: オーストラリアの先住民の部族名 trajektorio: 軌跡 procesio: 行列

次の各グループ4つの文の中で、上記本文に記述された内容に合致する文を1つ選んで、その番号に○をつけてください。(60点)

A.

1. Nun estas tagiĝo kaj oni povas pli kaj pli bone vidi la scenon.
2. Nun estas tagmezo kaj oni povas bone vidi la scenon.
- 3. Nun estas antaŭ vespero kaj oni povas iom post iom malfacile vidi la scenon.
4. Nun estas nokto kaj oni ne povas facile vidi la scenon.

B.

1. La spektantoj estis ĉiuj geknaboj.
2. La spektantoj estis ĉiuj plenkreskuloj.
3. La spektantoj estis unu knabo kaj kelkaj plenkreskuloj.
4. La spektantoj estis unu plenkreskulo kaj kelkaj geknaboj.

C.

1. La cirkonstanco estis tute silenta.
2. La cirkonstanco estis brua de kriĉantaj birdoj.
3. La cirkonstanco estis brua pro festanta procesio de blankuloj.
4. La cirkonstanco estis brua pro krietaj geknaboj.

Ĉ.

1. Elmaru ĵetis ŝtonon kiu atingis la procesion de blankuloj.
2. Elmaru ĵetis lancon sed ĝi ne atingis la procesion.
3. Elmaru ĵetis ŝtonon kiu ne atingis la procesion kaj falis antaŭ ĝi.
4. Elmaru ĵetis lancon kiu falis apud la procesio.

D.

1. Elmaru malamis la alvenon de blankuloj ĉar ili ĝenis la vivon de praloĝantoj.
2. Elmaru malamis la alvenon de blankuloj ĉar ili tro bruis en sanktejoj.
3. Elmaru malamis la alvenon de blankuloj ĉar ili ŝtelis monon.
4. Elmaru malamis la alvenon de blankuloj ĉar ili kredis alian religion ol la lia.

E.

1. La spektantoj povis bone vidi kiel la marŝantoj iras sube.
2. La spektantoj malklare vidis ke la marŝantoj iras piede.
3. La spektantoj malklare vidis ke la rajdantoj estis varme vestitaj.
4. La spektantoj malklare vidis ke la marŝantoj iras kun hundoj.

2. 次の文をエスペラントに訳してください。(40点)

出典はドナルド・キーンの「下町日記」です。

私は自著が「英国中の書店に並べられている」と勝手な想像でワクワクしていたのだ。だが、帰国してみると、どの書店にも置かれていない。出版元からは「今のペースでは、印刷した千冊を売り切るまでに 72 年」と連絡が来た。私が愛する日本の古典への英国人の無関心ぶりに、これ以上ないほど落胆した。

Mi estis ekscitita pro mia supozo ke mia libro estas vaste vendata en librejoj en la tuta Britio. Sed kiam mi revenis al Britio, mi trovis ke ĝi ne estas montrita en iu ajn librejo. La eldonejo informis min: “Ĝi bezonos 72 jarojn por esti finvendita pri la presitaj 1000 ekzempleroj, se la vendorapideco estos tiel sama kiel nun.” Mi estis plej forte elrevigita pro la indiferenteco de britoj al japanaj klasikaĵoj kiujn mi tre amas.

2 文法問題<100点>

1. 次の文の括弧の中に適当な前置詞を入れてください。前置詞は al, antaŭ, kun, per, por, sur の中から選び、同じ語を2回以上使わないこととします。

(30点)

Mia patrino sendis min malsupren (al) la herbejo (kun) kelkaj manĝaĵoj (por) la viroj. Revenante, mi vidis homon (antaŭ) mi (sur) la vojo.

2. 次の各文に間違いがあれば、それを正した文を下に書き、間違いがなければ下に○を付けてください。(40点)

(1) Li ludas gitaron pli bone ol sia frato.

Li ludas gitaron pli bone ol lia frato.

(2) Mi iros al Sendai urbo morgaŭ.

Mi iros al urbo Sendai morgaŭ.

(3) Kristoforo Kolumbo trovis la unua amerikan kontinenton.

○

(4) Mi jam informis tion al la klasanoj.

Mi jam informis la klasanojn pri tio.

3. 次の各語群のなかで、他と異質の語を一語指摘し、理由を述べてください。

(30点)

(1) mal, ge, aĉ, bo

aĉ は接尾辞、他は接頭辞

(2) trans, sub, inter, ol

ol は接続詞、他は前置詞

(3) bezoni, ĝoji, sidi, okazi

bezoni は他動詞、他は自動詞

3 自由作文<100点>

次の3つの項目の中から1つを選んで、それに関する100単語くらいのエッセイ文を書いてください。ちなみに上記一般問題の読解文章は600単語ほどです。

1. kronviroza epidemio
2. mia hejmurbo
3. mia elementa aŭ meza lernejo

Via elektita temo:

Viaj frazoj:

(省略)

Interparolado <100 点>

1. Sinprezento (Mi petas vin prezenti vin mem.)
2. Libera dialogo kun la ekzamenato